# Kluba Bulteno

**Organo de Klubo Esperantista en Oslo**

**N-ro 1 2012** **Ĵaŭdon la 2an de februaro** **60a jaro**

# Kalendaro

Ni komencas je la 19a horo.
**Kie? /** ***Hvor?*** **–** vd. malsupre / *se nederst på siden.*

**Lundon la 6an de februaro** (semajno / *uke* 6) – *mandag*

Okaze de la 125-jara jubileo de Esperanto en 2012 ni volas vaste dis-informi pri la nova interreta kurso (vd. ankaŭ la 3an paĝon). Ni diskutos taŭgajn tekstojn por la informiloj.

*I anledning esperantos 125-års jubileum i 2012 vil vi spre nyheten om det nye internettkurset (se også 3. siden). Vi diskuterer og velger gode tekster for info-materialet.*

**ĴAŬDON ! la 23an de februaro** (semajno / *uke* 8) **– TORS***dag*

Ni kolektos utilajn interretajn adresojn pri Esperanto (povas esti kursoj, radio–programoj, vortaroj, tradukiloj, kalendaroj ....) og diskuterer dem.

*Vi samler nyttige internettadresser om esperanto (kurs, radioprogrammer, ordlister, oversettelsesprogrammer, kalendere ...) og diskuterer dem .*

**Lundon la 5an de marto** (semajno / *uke* 10) – *mandag*

JARKUNVENO. Vd. la dorsan paĝon.

*ÅRSMØTE. Se baksiden..*

**Lundon la 19an de marto** (semajno / *uke* 12) – *mandag*

Ni serĉos – kaj klarigos – lingvajn erarojn en tekstoj el Esperanto-revuoj. Krome: renkontiĝo kun Pepita de Caspary, Asker, prezidinto de nia klubo (1973–80).

*Vi søker etter – og forklarer – språklige feil i esperantotidsskrifter.*
*Dessuten: gjensyn med Pepita de Caspary, Asker, klubbens leder 1973–80.*

---

**Kunvenejo** ("Esperantonia") Olaf Schous vei 18 (enirejo en Schouterrassen) en Sinsen. Buso 31 aŭ tramo 17 al Rosenhoff kaj de tie iru supren laŭ Båhusveien; aŭ iru malsupren de Sinsen T (buso, metroo) aŭ de la haltejo Sinsenterrassen (nur tramo) laŭ la samnoma strato.

# OKAZIS

**5. septembro. La UK en Kopenhago**

Ni kolektis impresojn pri la UK – ĝuojn kaj ĝenojn: la tranoktejoj, la metroo, la inaŭguraj salutoj, la sciencaj prelegoj, la kulturaj diskutoj. Kaj reaŭdis ilin per Interreto.

**19. sept. La postkongreso en Oslo**

Ni rerigardis al la postkongreso en Oslo, kun la multaj spertoj agrablaj kaj amaraj. Aperis pluraj neatenditaj problemoj dum la planado kaj dum la aranĝo mem, sed kelkfoje sukcesis improvizaj solvoj. Ni konstatis ke la problemojn ofte kaŭzis nebona komunikado, foje inter la organizanto kaj la helpantoj, foje inter tiuj kaj dungitoj de UEA aŭ de la hotelo aŭ la ŝipkompanio, kaj foje inter ĉi tiuj mem. Ĉefaj lernaĵoj estas, ke alian fojon la aranĝontoj pli bone kune planu kaj pli klare disdividu la taskojn; kaj ke oni ne akceptu novajn aliĝojn post la limdato.

**3. oktobro. NJE en Finnlando.**

Du el tiuj ses gejunuloj, kiuj vizitis la finnan junularon fine de aŭgusto, venis por raporti pri sia agrabla semajnfino en Helsinko kaj proksima arbara kabano. Fine ni havis ankaŭ utilan diskuton pri afiŝo pri la baldaŭa kurso en la universitato kaj pri informado per Interreto.

**17. okt. Interkultura komunikado**

Nia gasto, Kristin Tytgat el Belgio, profesia lingvisto ĉe EU, faris multajn interesajn kaj gravajn observojn pri la malsamaj stiloj de komunikado ĉe diverslandanoj, ekz-e ke rekta peto ĉe nordlandano povas esti sentata kiel ofendo ĉe homo de la sudo, kie oni kutimas enpaki siajn dezirojn en ĝentilaj esprimoj. Kaj en kelkaj kulturoj oni ankaŭ ne rekte demandu pri ies politika prefero aŭ jara enspezo. Ĝuste esperantistoj kolektas abundajn spertojn pri tiaĵoj. Ĉu iu verkos gvidlibron?

**7. novembro. La ekonomikaj krizoj**

Bjarte Kaldhol klarigis al ni pri la situacio en la monda financa merkato, ni diskutis pri la nuntempa kaj antaŭa ekonomiaj krizoj, kaj li donis al ni konsilojn pri investoj.

**21. novembro. Skeptiko**

Kristoffer Haug rakontis pri la internacia organizo Skeptiko, kaj ni diskutis multajn aktualajn fenomenojn: Unuflanke ni pretu skeptiki pri ekz-e astrologio, homeopatio kaj magiaj kristaloj. Sed aliflanke ni limigu la skeptikemon kiam temas ekz-e pri Holokaŭsto, klimataj ŝanĝoj kaj evoluado de la vivo. La diskuto servis ankaŭ por riĉigi nian vortprovizon Esperantan: *krita maso, adrenalino / epinefrino, ateliero* (diskutgrupo dum seminario) kaj multajn pliajn utilajn terminojn ni notis.

**5. decembro. Skajpe kun Kopenhago**

Por la unua fojo ni kun-venis – ne, forrenkontiĝis – kun alia klubo, per Skajpo kaj komputila ekrano. Ni interŝanĝis spertojn kaj ideojn kun la klubo de Kopenhago pri niaj respektivaj agadoj. Kelkajn iliajn metodojn ni povus kopii – tagmezajn kunvenojn por pensiuloj (k.a.?) en botanika ĝardeno, studrondo antaŭ kluba kunveno, aliĝi al la Kultura Nokto. Sed iliaflanke tute mankas en

Danio ŝtata subvencio por studrondoj!

**19. decembro. Tago de la Libro**

Okaze de la Tago de la Libro (Zamenhofa tago), efektive kelkajn tagojn antaŭe, ni prezentis librojn – ne multajn, ĉar malmultis la ĉeestantoj – sed sufiĉe stimule. Interalie ni teruriĝis aŭskultante makabran novelon tragike aktualan ĉi-jare kun subtitolo *Noticoj de psikopato*, de Valerij Brjusov (1908). Poste ni revenis al la normala mondo respondante zamenhofan kvizon el Kopenhago.

**2. januaro. Esperanto en 2012**

Kiaj perspektivoj por Esperanto en 2012? Post iom disflua interparolado pri diversaj variantoj de la norvega, Tuki pona kaj aliaj lingvoj ni turnis nin al la 125-jara jubileo de Esperanto kaj la planata 125-era kurso de ILEI. Ni rapide venis al pluraj bonaj ideoj: ke ni varbu por tiu kurso per disdonado de kartetoj en manĝejoj en la urbo kaj en la universitato, ke la klubo esploru ĉe niaj kolegoj en Tromsø kiel akiri senpagan propran interretejon kaj ke ni proponu al NEL kampanjon pri leteroj de leganto al ĉiuj lokaj gazetoj okaze de la jubileo 26. julio.

**16. jan. Ĉu ion lerni de la misiistoj?**

Ĉu ni povas ion lerni de la aktivado de la misiistoj? Ni konstatis ke truda misiismo ne taŭgas por informado al okcidentanoj, sed ke ĝi ofte sukcesis en aliaj mondpartoj. De unu praktiko de certaj misiistoj ni eble povas tiri paralelon: ili emas frapi ĉe hejmaj pordoj dum la dimanĉa diserva tempo, ĉar tiam ili renkontas homojn ne tro firme ankritajn al jama kredo. Simile ni eble lasu la nordeŭropanojn, kiuj jam firme fidas pri la universaleco de la angla lingvo kaj investu nian misiemon alilande?

DD

---

# Jubile-jara informkampanjo

# *Jubileumsåret 2012 – info-kampanje*

Por la 125-jariĝo de Esperanto la internacia instruista ligo ILEI verkas nov–stilan interretan kurson kiun oni sekvu en la 125 tagoj ekde la 23a de marto ĝis la datreveno la 26an de julio. (Vd. *N.E-isto* 5/2011 kaj 1/2012.)

Do en marto ni lanĉos kampanjon disdonante flugfoliojn kaj kartetojn kun la interreta adreso. Sed por ke tio sukcesu, ni bezonas helpon de niaj membroj!

**Kiom da kartetoj (kaj flugfolioj?) ni sendu al vi? Ĉu 1? 5? 50? 100? Kaj ĉu afiŝo por biblioteko aŭ komun-domo?**

*I anledning esperantos 125-års jubileum blir det laget et nytt kurs på internett, som man vil kunne følge i de 125 dagene fra 23 mars og frem til jubileumsdagen 26 juli. (Se* Norvega .Esperantisto *5/2011 og 1/2012.)*

*Da skal vi i mars lansere en informasjonskampanje og spre flygeblader og små kort med bl.a. internettadressen. Men skal det lykkes, trenger vi din hjelp!*

***Hvor mange kort (og flygeblad?) skal vi sende til deg: 1? 5? 50? 100? Enn en plakat til biblioteket eller bydelshuset?***

# Jarkunveno / *Årsmøte*, lundon / *mandag* 5. marto

## Tagordo / D*agsorden*

1. Aprobo de la kunvoko
2. Elekto de prezidanto de la kunveno kaj de protokolanto.
3. Jarraporto (Ni antaŭsendos ĝin retpoŝte, kaj paperpoŝte al tiuj kiuj petos ĝin.)
4. Jarkalkulo (same)
5. Ricevitaj proponoj.
6. Elekto de estraro, revizoro kaj reprezentanto en la domkomisiono,. ĉiuj kun anstatŭanto(j). Ankaŭ nova elekta komisiono.

*1. Godkjennelse av innkallingen.*

*2. Valg av møteleder og referent.*

*3. Årsrapport.(sendes ut med e-post. Papirutgaven sendes til de medlemmene som ber om den.)*

*4. Årsregnskap. (sendes på samme måte)*

*5. Innkomne forslag .*

*6. Valg av styre, revisor og representant i huskomiteen – alle med vara – samt valgkomité.*

---

ĈU VI HAVAS **PROPONON** por la jarkunveno? Ĝi atingu la estraron plej malfrue tri semajnojn antaŭ la kunveno – t.e. lundo de semajno 7, do la 13a de februaro. (Por statutŝanĝoj la limdato estis jam 10. januaro.)

*HAR DU* ***FORSLAG*** *til behandling på årsmøtet? Styret må ha det senest tre uker før møtet, dvs. mandag 13. februar. (For vedtektsendringer var fristen 10. januar.)*

---

# Ĉu iu volas lui kunvenĉambron? – *leie møterom?*

*Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie møterommet vårt for én eller flere kvelder? Eller en helg? Vi trenger leieinntekter! Brosjyre med nærmere opplysninger og bilder kan du få fra kontoret.*

---

## Tamiko

Tamiko Kaŭakami venis al ni el Japanio fine de la 60aj jaroj kaj iĝis dumviva membro de NEL. En la lastaj jaroj ŝi loĝis parte en Tajlando. Sed en 2010 ŝi serioze vundiĝis en motorcikla akcidento tie. Tiam ŝi revenis al Oslo kaj estas nun flegata en *Kantarellen bo- og rehabiliteringssenter*, Mortensrud (Suda Nordstrand). Ŝi sidadas en rulseĝo, tamen ŝia sanstato multe pliboniĝs en la daŭro de la lasta jaro, kaj ŝi nun povas iom paroli kaj eĉ ludi pianon, raportas Astrid Mansrud.

---

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo.Tlf. 22 35 08 94
www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: <oficejo[a]esperanto.no>
Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).

Ĉi tiun *Bultenon* prizorgis Douglas Draper